# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' . --- Sceno du

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la duan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.***
La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

| | |
|---|---|
| 1. pena -------------------- | A. baza |
| 2. kulmina -------------------- | B. ciferoj kiuj indikas koloron de io |
| 3. koordinatoj -------------------- | C. ciferoj kiuj indikas pozicion de io |
| 4. kontrakto i -------------------- | Ĉ. ekstreme stulta |
| 5. fundamenta -------------------- | D. esplor-provo sub regataj kondiĉoj |
| 6. postuli ion -------------------- | E. insisti pri io |
| 7. teorio -------------------- | F. la malo de praktiko |
| 8. eksperimento -------------------- | G. landmaso |
| 9. modera --------------------- | Ĝ. leĝa dokumento |
| 10. kontinento --------------------- | H. malfacila |
| | Ĥ. milda |
| | I. pinta |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Meri riproĉis la aliajn sciencistojn ĉar ili estis tro _________.**
a) monavidaj
b) klarvidaj
c) perfidaj
ĉ) gepatridaj

**2. Ili ŝanĝis la ______ de l'scienco.**
a) kuraĝon
b) vizaĝon
c) kapon
ĉ) nazon

**3. Ilia eksperimento transportis _________.**
a) pomon
b) terpomon
c) piron
ĉ) terpiron

**4. Derek imagas ke ili riĉiĝos transportante ______.**
a) aviadilojn por Boeing
b) hamburgerojn por McDonalds
c) vidbendojn 'Pasporto' por ELNA
ĉ) pomojn por Monsanto

**5. Ken komprenis ke oni povos sendi homojn al tute alia _________.**
a) lando
b) kontinento
c) restoracio
ĉ) planedo

**6. Ne ekscitiĝis dum ĉi tiuj du scenoj __________.**
a) elektronoj
b) sciencistoj
c) Derek
ĉ) esperantistoj

**7. Meri indigne demandis al la aliaj, ĉu ili estas sciencistoj aŭ __________.**
a) statistikistoj
b) esperantstoj
c) komercistoj
ĉ) idealistoj

**8. Kiam Derek ekkomprenis ke ili povas transporti homojn, li komprenis ke ili povos bankrotigi __________.**
a) aspirin-fabrikojn
b) flug-kompaniojn
c) teler-fabrikojn
ĉ) frukto-enskatoligajn kompaniojn

**9. Ili atingis la ________ ___________.**
a) kritikan koncentriĝon
b) kriketan kontuziĝon
c) koketan vertiĝon
ĉ) tritikan vertikaliĝon

**10. Derek sopiras je gajno de __________.**
a) olimpika medalo
b) Oskara premio kun statueto
c) Nobel-premio

ĉ) dek sep mil pomoj

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon.*

| | |
|---|---|
| L A R M I S V O K | □ □ □ _ _ _ _ _ _ |
| R I N G O S A K V O | □ _ _ □ _ □ _ _ _ _ |
| S T R A T P O R L I N O | □ □ _ _ _ □ _ _ _ _ _ _ |
| N O K T A K O R T | □ □ □ _ _ _ _ _ _ |
| E N S I D | □ □ _ □ _ |
| P I Z E G O S E N S | □ _ _ _ □ _ □ _ _ _ |
| B E L P O M K E R N E | _ □ _ _ _ □ _ _ _ _ □ |

Post la fuŝa agado de Ken, restis nur la

_ _ _ _ _   _ _   _ _   _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

## 4) DEMANDOJ

1. Kie okazas la sceno kaj kiuj rolas en ĝi?
2. Kio estas la celo de la eksperimento kiun ili klopodas?
3. Kiu estis la unua ideo de Derek kiam la eksperimento sukcesis?
4. Klarigu la du sencojn de la vorto "malkovri".
5. Kiun gravan eraron faras Ken dum Meri oratoras?
6. Pri kia honorigo pensas Derek, pro la sukcesa eksperimento?
7. En kiuj sencoj piro similas al pomo? Kiuj estas la diferencoj?
8. Kial ili preferas transsendi domojn ol pomojn? Donu du respondojn.
9. Ili bezonas novan eksperimenton - kion kaj kiun ili transsendos?
10. De kio kaj kiu ili ŝanĝis la vizaĝon?

**5) PARIGU**

*Jen fraz-komencoj kaj fraz-finoj pri la sceno. Ligu ilin. Por la intelekta stimulo, vi havas du superfluajn fraz-finojn. Plezure liveritaj!*

| | | |
|---|---|---|
| 1. La sciencistoj ŝanĝis... | A | pomon kaj homon. |
| 2. Ili tuj kontaktos... | B | palindromon. |
| 3. Ili sukcesis transigi... | C | novan eksperimenton. |
| 4. Ken fortiris... | Ĉ | la vojon al Nobel-premioj. |
| 5. Ken malkovris... | D | la vizaĝon de l'scienco. |
| 6. La sciencistoj malkovris... | E | la teleron. |
| 7. Laŭ Derek, ili malfermis... | F | la pom-kernon. |
| 8. Piro kaj pomo similas, ambaŭ havas... | G | la kurtenon. |
| 9. La sciencistoj decidis fari... | Ĝ | la kompanion Monsanto. |
| 10. Derek volis aĉeti | H | la arton transigi objektojn. |
| | Ĥ | kvar literojn kun du identaj. |
| | I | akciojn en aspirin- kaj teler-fabrikoj. |

++++++++++++++++++++++

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).**